



M.Malovec priparolis metodikon de kurso A, aŭdigis al ni surbendigitan instruhoron de T.Kilián kaj montraĵojn en jugoslavdevena lumbilda instruado. Ankaŭ s-anino Rýznarová sciigis al ni siajn riĉajn spertojn el la instruado, precipe de infanoj. Ĉar la vetero estis vere somera, prelegantoj agrablaj, etoso bonega, ludoj plene travivataj, tendara fajro fajranta, la restado kontentigis ĉiujn. Estas rekomendinde al ĉiuj junaj esperantistoj, kiuj estonte volas instrui Esperanton aŭ helpi dum esperantistaj kunvenoj, ke ili partoprenu similajn eblecon por ĉerpi spertojn kaj plibonigi siajn kapablecojn. V.Pospíšil, Žel. Brod.

M.Malovec promluvil o metodice kursu A, pustil nám magnetofonovou nahrávku vyučovací hodiny T.Kiliána a ukázky z vyučování pomocí diapositivů jugoslávských. Také s-anino Rýznarová nám sdělila své bohaté zkušenosti z vyučování zvláště dětí. Poněvadž počasí bylo vpravdě letní, přednášející příjemní, nálada výborná, hry úplně prožívané, táborový oheň plál, pobyt každého uspokojil. Je dobré doporučit všem mladým esperantistům, kteří v budoucnu chtějí vyučovat Esperantu nebo pomáhat při esperantských schůzích, aby se zúčastnili podobných možností k čerpání zkušeností a zlepšili své schopnosti. V.Pospíšil, Železný Brod.

XIV-a printempa pacmarŝo en Jablonec.n.Nisou. Sub emblemo de Internacia jaro de paco ekmarŝis la 26-an de aprilo 1986 preskaŭ 500 homoj – esperantistoj el diversaj ĉeĥoslovakaj kluboj, gastoj el GDR (Zittaŭ, Meissen, Bernaŭ, Gorlitz, Leipzig, Dresden), Polujo (Swiebodzice, USSR (Gomel) kaj multaj neesperantistaj turistoj, gepioniroj k.a. Tradician aranĝon organizis Esperantista klubo ĉe Kulturdomo en Jablonec nN sub aŭspicio de distrikta packosilantaro. Partoprenantoj povis elekti diversajn distancojn laŭ sia sperto – je 18 km, 27 km aŭ 35 km tra pitoreska regiono inter la urbo Jablonec kaj tiel nomata „Ĉeĥa paradizo“ en ĉirakŭaĵo de ripozcentro Malá Skála. Premion de Ĉeĥa Esperanto Asocio (Ĉeĥan vitron) ricevis dum amika vespero post la marŝo reprezentantoj de la plej multnombraj esperantistaj grupoj – el Praha, Zittaŭ aŭ Meissen. La plej multnombraj grupoj de turistoj kaj pioniroj ricevis similajn premiojn de distrikta packonsilantaro. Eksterordinaran surprizon por eksterlandaj grupoj preparis membro de la klubo en Jablonec nN profesoro Jaroslav Hradecký, kiu pretigis apartajn medalojn kun simbolo de la internacia jaro de paco kaj dorsflanke kun dato de la marŝo. La marŝo dum suna printempa vetero bone sukcesis. Ĉiuj subskribis porpacan rezolucion kaj ricevis diplomojn, turismajn publikaĵojn pri la regiono kaj informojn pri esperantomovado. Dum amika vespero oni jam pridiskutis venontjaran jubilean XV-an marŝon, en kies programo esperantistoj el Jablonec preparas kelkajn allogajn novaĵojn. Jam hodiaŭ ni invitas vin -venu la 25-an de aprilo 1987 al Jablonec nad Nisou.

Kiu deziras havi insignojn pri la Pacmarŝo, li sendu 2 Kčs al la adreso de la klubo.

Ĉijara Nikolao-vespero en Jablonec okazos sabate la 6-an de decembro 1986. Estas rekomeninde jam nun aliĝi per sendo de poŝtkarto al ESPERANTO, pk 1900, 46621 Jablonec nN. Varbu viajn eksterlandajn amikojn!

Dum la tuta jaro vi povas ferii en Poprad en la domo de Slovaka esperanta asocio, Sobotské nám. 6. Por membroj de SEA kaj ĈEA unu lito kostas 25 Kčs potage.

Během celého roku můžete si udělat rekreaci v Popradu v domě Slovenského esperantského svazu, Sobotské nám. 6. Členové SEA a ČES platí za lůžko 25 Kč denně

La nova vortaro Esperanto-ĉeĥa kaj ĉeĥa esperanta estas kompilata kaj la laboro sukcese progresas. Ĝi – laŭ decido de Ŝtata pedagogia eldonejo – ne povas esti plua eldono de la vortaro de Hromada, sed ĝi devas enhavi novajn terminojn kaj havos amplekson de tiel nomataj „mezaj vortaroj“. Posedantoj de Plena Ilustrita vortaro, kiuj volas kunlabori, afable skribu al Karel Kraft, Županovice 49, 26215 Borotice

Interlingvistiko – Esperantologio (kolekto de studoj kaj sciencaj komunikoj) kunmetis, redaktis kaj antaŭparolis Violin Oljanov, manuskripton recenzis Ĥristo Gorov, eldonkvanto 1000 ekzempleroj, prezo 2,05 levoj, ofset-presita de Bulgara EA, Sofio 1985. Temas pri kompilaĵo de 26 studoj de 15 aŭtoroj el 7 landoj. La kunmetinto rikoltis tiujn verkojn plejparte el la jarkolektoj de „Filologo“, organo de esp. filologoj.

Zamenhof -ĉu kuracisto aŭ filologo? Z. konis perfekte la rusan lingvon. Tiu estis la hejma lingvo de lia familio (gepatra). Estante junulo, li revis fariĝi rusa poeto. Avo kaj patro de Z. estis filologoj. Z. finis kun perfekta sukceso la Duan Filologian Gimnazion en Varsovio, kie li lernis ne nur okcidentajn lingvojn, sed ankaŭ rusan kaj malnovbulgaran lingvojn. Kaj oni ne forgesu, ke Zamenhof havis je sia dispono la bibliotekon de siaj avo kaj patro, ambaŭ fakuloj pri lingvoj kaj belliteraturo. Tiu biblioteko enhavis ĉiujn fundamentajn verkojn de XIXa jarcento. Bedaŭrinde regas la mizera aserto, ke Z. estis nur laiko en la lingvoscienco. Malamikoj de Esperanto argumentas per aserto, ke Esperanto estas ideo de laiko, nekonante la vivon kaj verkon de Zamenhof. Paco 1/86, p.13. C.Murin.

STARTO, oficiala organo de ĈEA estas nun regule presata en RUCH Liberec. Ĉar nun mankas materialo, afable sendu viajn kontribuojn al ĈEA kaj signu viajn leterojn: „Por Starto“.

STARTO, oficiální orgán ĈES je nyní pravidelně tisknut v RUCHu, Liberec. Protože chybí materiál, laskavě posílejte příspěvky do ĈES a označte je: „pro STARTO“.

S-anino Eli Urbanová el Prago, esperanta konata poetino per elekto la 16-an de aprilo fariĝis membro de la Akademio de Esperanto. Kune kun Marjorie Boulton estas nun du virinoj inter la akademianoj kaj kun Karolo Piĉ du reprezentantoj de nia lando. Ni kore gratulas! (Inter pluaj novaj akademianoj estas ankaŭ konata aŭtoro de germana esperanta vortaro dro Erich Dieter Krause el Leipzig).

80-jara esperantistino en Lidice. La 8-an de aprilo 1986 ĝisvivis 80 jarojn s-anino Růžena Lišková-Vyžvaldová, virino, kiu sukcesis transvivi la terurojn de naziaj koncentrejoj, la ekzekuton de sia unua edzo (Liška) kaj forrabon de sia fileto Mireček. Ŝia patrino Marie Nováková, esperantistino en Lidice pereis en koncentrejo Oswiecim (1944-11-25). Ŝian duan edzon Vyžvald ŝi ekkonis en la Somera Esperanto-Kolegio en Doksy en la j.1948. „Ligis nin reciproke tion da komunaj interesoj – ĉefe Esperanto“, ŝi skribis al mi. „La morto de mia edzo (en 1985) estis tro kruela bato por mi. Mi estas dankema, ke vi tiris min per via letero el miaj dolorplenaj pensoj, kiuj min daŭre persekutas, - al la estinta interesiĝo – Esperanto.“ - Gratulante postfeste al s-anino Vyžvaldová ni deziras al ĉi plenan konsoliĝon.

Květa Stanislavová, Mnichovo Hradiště, Rudé armády 251, membrino de ni klubo estis solene promociita la 26-an de junio en aŭlo de praga Karolinum-o post fino de sia filologa studado en filozofia fakultato kun la plej bona taksado. Ŝi estas esperdona samideanino kaj ni kredas, ke baldaŭ la esperanta publiko aŭdos pri ŝiaj sukcesoj ankaŭ surkampe de la Internacia Lingvo. Elkoran bondeziron!

Ĉu imitebla? Ĉi-printempe ekfloris en Netolice fare de malgrandaj anoj de junulara Eo-rondeto en la parko kunmetita de floroj granda litero E. Ĉu ankaŭ en aliaj urboj tia propagando eblus komence de la jubilea jaro?

Kontraŭmilitaj bildkartoj – desegnaĵoj de la konata artpentristo Pavel Rak en tri specoj estis presitaj kaj eldonitaj fare de la klubo Esperanto, poŝtkesto 55, 70300 Ostrava Vítkovice. Prezo tre modesta –20 hal. Tre konvena donaco por viaj eksterlandaj amikoj. Dum mondo de pli ol 1000 pecoj rabato 25%.

Ĉu vi scias, ke ĈEA okaze de la 100jara festojaro fondis jubilean fonduson por ebligi preson de afiŝoj, medaloj, surgluaĵoj kaj publikaĵoj informantaj pri tiu ĉi grava evento? Ĉiuj, kiuj kontribuos per pli ol 100 Kčs ricevos memorigan diplomon. Via donaco helpas la disvatigon de nia kara lingvo.

Víte, že ČES u příležitosti 100.výročí založil jubilejní fond, který umožní tisk plakátů,, medailí, nálepek a publikací, informujících o této důležité události? Všichni, kteří přispějí více než 100 Kčs dostanou pamětní diplom. Váš dar napomůže tak rozšíření našeho drahého jazyka.

100a jubilea kongreso en Varsovio: Pri la partopreno estas granda intereso inter esperantistoj de la tuta mondo. La partopreno estas limigita por ĈES 200 membroj – prefere por dumvivaj. Estiĝante dumviva membro (600 Kčs) vi havos pli grandan ŝancon partopreni.

Stý jubilejní kongres ve Varšavě: O účast je velký zájem mezi esperantisty z celého světa. Pro český esperantský svaz je rezervováno místo pro 200 členů – přednostně pro doživotní. Stanete-li se doživotními členy (600 Kč) budete mít větší naději na účast.

Letero el Meksikio: Esperanta klubo en Vítkovice estis en oktobro estintjare inicianto de la agado de solidareco inter esperantistoj de ĈSSR. Ĝi estigis monkolekton por fonduso desolidareco kaj alvokis por tia agado aliajn klubojn. Vico da ili aliĝis. Inter la unuaj estis Praha kaj Pardubice. Jen citaĵo el la dankletero el Meksikio:

Dank` al Dio, mi povas ĉi tiun leteron skribi, pensi, ekzisti. Plenkore mi dankas por la afableco, zorgemo kaj helpo el la membroj de la esperanta klubo, kiuj helpis al nia nacio post terura katastrofo. Ni neniam travivis militon, sed nia urbo estis detruita same kiel post la plej terura milita bombado. La tertremo postulis multajn oferojn kaj je vivo kaj je posedaĵo. Multaj homoj perdis sian familion, tutan havaĵon kaj esperon pri sia estonteco. Meze de tiu sufero kaj teruro Via helpo mildigis nian turmenton kaj donis al ni esperon, ke homamo ankoraŭ ekzistas kaj ne perdiĝis. Iam ni dubas, ĉu ĝi ekzistas. La mondo kondukas freneze, brutale, kiel en la besta regno. Vi povas imagi, kiel nia dense prilogiinta urbo estis senpova, ektimigita, suferanta. Ĉio okazis en centro, kie troviĝas luksaj vendejoj kaj hoteloj. En la suda parto, kie mi loĝas, ni estis trafitaj nur per sekvoj, malbona funkciado de kurento, telefono, trafiko. Poparte estis nia urbo reparita al estinta beleco por esti preparita por akcepto de turistoj precipe de futbalistoj de la mondo ĉampioneco. Dum la lasta tempo mi ne povas kompreni, kial estas tiom elspezite por militarmado, se mi bezonas monon por forigi sekvojn de la katastrofo. Tute mi ne komprenas fakton, kial ni, ordinaraj homoj, devas estiĝi oferoj de la frenezaj militavidaj potenculoj. Kial ili pereigas la vivon, kiu sendube estas miraklo, nur por montri sian potencon nur pro ilia stultuleco kaj avida emo. Danke dion ni povas ankoraŭ ĝui mirindan belecon de matenoj kaj krepuskoj, verdajn valojn, marojn, gigantajn montarojn, senfinan firmanenton ornamitan per steloj kaj suno, kiu radias por ĉiuj... Mi restas via fidela amikino. Alicia Zepeda

Loko por komencantaj aŭtoroj:

František Nepil. Grenado en muzeo. Esperantigis Hájková Marie, 50000 Hradec Králové, Švabinského 519.

Do, mi konjektas, ke eble vi ne ĉiuj scias, kio estas „bolaso“. Multaj homoj ĝis nun ne estis en Suda Ameriko, kaj se ili estis, eble ili ne estis en farmo. Tie estas disvastigita (rozŝirfena) bredo de brutaro (chov skotu). Bovinoj estas, kiel vi scias, hejme breditaj (chované) bestoj, sed en Suda Ameriko neniu diris tion al ili kaj kiu volas havi bovidinon (jalovičku) aŭ junan taŭron, tiu devas kapti ilin. Kaj ĝusta tial oni bezonas la „bolason“. Tio estas ŝnurego al kiu estas ligita metala bulo. Se oni rajdas (jede na koni) malantaŭ kuranta junbovino, „bolaso“ ekturnas super la kapo kaj ĵetas lerte teren, tiam „bolaso“ ĉirkaŭvolvas al junbovino kaj ĝi falas teren. Ĉu vi komprenas, ke tiu bulo ne estus por trafi la bovinon sur kapon? Do nun vi scias, kio estas „bolaso“. Kaj tion, ke dum la jaroj 1914-ĝis 1918 estis la unua mondmilito, tion vi scias certe ankaŭ.

En iu muzeo oni havis man-grenadon (ruční granát) el la mondmilito. Tian metalan oveton (vajíčko), sed ne plu kie ekspoziciaĵo, sed sur skribotablo kiel ŝarĝilo. Kaj ĉi tiu grenado tre kolerigis muzean ordigistinon (uklížečku). Ŝi ofte deĵetis ĝin teren eĉ iam sur sian piedon, iu-okaze ŝi diradis al ĝia posedanto: „Sinjoro doktoro, mi iam tiun aĉaĵon (ohavnost) elĵetos en cindr-ujon (popelnice). Denove ĝi falis – ĉu vi devas havi tion sur la tablo?“ Kaj li respondis: „Mi devas, kara, sinjorino, ĉar tio estas ŝarĝilo (těžítka) kaj se mi ne havus ĝin sur la tablo, trablovo disĵetus ĉiujn paperojn.“ - De tempo al tempo venis iu kolego el alia muzeo. Li estis tia hastema tipo, kiu neniam havas tempon, kiu ĉiam alkuregas kaj „rapapa, rupapa, rapide, rapide, mi jam kuras, mi tre hastas!“ Do foje sinjoro doktoro konkludis, ke finfine li tiun grenadon ne bezonas. Kaj dum la kolego ordigis sian materialon en aktujon, la doktoro sensuspekte metis tiun ŝarĝilon en poŝon de lia surtuto – por ke estu ŝercamuzo, kiam li rimarkos tion, ĉar poste li ĝin portos plue, ĉu? Kvankam tion ne estas korekta, sur trotuaro eblas elŝuti (vysypat) ekzemple ŝelojn de oranĝoj, sed ne grenadon! Do tiu hastema kolego nenion rimarkis, diris „mi kuras, mi tre hastas“, kaj rapidis de etaĝo en teretaĝon kun grenado en la poŝo de sia printempa surtuto (svrchník). Kaj ĝuste en la moment, kiam li turnis sin sur planko de interetaĝo lia surtuto ŝanĝigis ja la „bolaso“ sudamerika. Sed ĝi ne ĉirkaŭvolvis krurojn de bovidino eĉ ne proprajn piedojn. La surtuto ĉirkaŭvolvis marmoran kolonon kaj tute alligis tiun kurantan scienciston al la kolono. Vi ĉiuj jam travivis, ke se oni dum hasto per io haltiĝas kaj aliksiĝas, ke tio estas nenio agrabla. Sed tiam ne restis nur ĉe haltiĝo. La ŝarĝila grenado, kiu dum kvindek kvin jaroj faladis desur la tablo tute sen sekvoj – subite eksplodis. Tio estis paf-ego (strašná rána). Eksplodo en domo estas kiel kvindek grenadoj ekstere. En muzeo tio forŝiris balustradon kaj disrompis kelkajn fenestrojn kaj vitrinojn kun ekspoziaĵoj. Nur tiu sciencisto restis en ordo. La grenado ja eksplodis en lia poŝo, sed en fatala momento ĝi troviĝis malantaŭ la kolono. Kiam tiu doktoro, kiu al li enpoŝigis la grenadon, vidis lin starantan meze de tiu dezerto, li opiniis, ke aperis diablo. Ĝis nun neniu scias, kial grenado eksplodis, tiu malzorgemo eĉ post kvindek kvin jaroj oni povas detrui balustradon, surtuton kaj ŝercamuzon. Kaj tiun lastan ni ĝuste pli bezonas ol balustradoj kaj surtutojn. Kvankam same kiel vi mi ne opinias, ke ĉi tiu spritaĵo estas konvena modelo por ŝercado.



Koncize el la esperanta gazetaro:

Stručně z esperantského tisku:

Scienca Eldona Centro (SEC) en Budapeŝto estis malfondita (1985). Oficialaj kaŭzoj laŭ la jarraporto de UEA - 1) La siatempe ellaborita dokumento pri la eldona politiko de SEC estis neniam serioze atentata en praktiko, tial, ke aperis pluraj malgravaj kaj por la merkato neinteresaj verkoj. - 2) Dum sia kelkjara ekzisto ne sukcesis utiligi grandan komencan investon por generi novajn rimedojn. - 3) Malgraŭ multaj laŭtaj asertoj, ke la movada merkato soife atendas fakajn librojn, la realo montriĝis alia: kun escepto de la verkoj: Ĉu vi konas la Teron? - kaj Amuza matematiko – la eldonaĵoj de SEC tre malbone vendiĝas, kiel en Budapeŝto, tiel en Rotterdamo. La interesiĝo de la publiko pri teknika literaturo restas tute magra. Feliĉe ilian eldonkoston plejparte kovris diversaj reklamtekstoj. - (Noto de la redaktoro: Kion povas diri la simpla esperantisto al tiu problemo? Ni ĉiuj esperis vidi en stablo de SEC post la budapeŝta kongreso rimedon, kiel ponti la problemon nepagipovebleco. Nun la seniluziga raporta sciigo ... Se ni rigardas la uea-budĝeton kun ĝia debito kiu estis *kunfarita* el apartaj fondusoj donacaj, mi opinias, ke la tasko ke-pri komencajn malfacilaĵojn de SEC devis esti la unua tasko. Certe, ni ne estus kapablaj krei novan ampleksan klarigan esperanto-esperantan vortaron, ĝi estus rapide disvendinta, ĉar daŭre nur kelkaj unuopaj feliĉuloj en socialismaj landoj posedas PIVon. Se ni havus sufiĉe vastan membrobazon de kleraj lingvokonantoj, kiuj estus kapablaj legi kaj uzi fakan lingvon, certe estus ankaŭ vendebla faka gazetaro, libroj. Samideanoj en la evoluiĝantaj landoj (ekz. Irano, Ĉinio) nemulte interesiĝas pri belliteraturo, sed ĝuste pri fakaĵoj, lerneblaj helpe de facila Internacia Lingvo. Mankas ankaŭ ĝenerala kleriga revuo, kiu enhavus popularsciencajn artikolojn, geografikaĵojn kaj aliajn amuzajn artikolojn krom esperantaj heroldaĵoj, kiuj por sperta esperantisto iam estas iom tedaj, laŭ la ekzemplo de *Monato*, kiu batalas por sia vivo, nehavante sufiĉan abonantaron en kapitalisma merkato.)

LI kaj NI: Festlibro por la 8-a naskiĝjaro de Gaston Waringhien – recenzo en Esperanto fare de Detlev Blanke. Trafe kaj koncize estas fare de Blanke estas komentariitaj solenaj kontribuajoj de 27 elstaraj esperantistoj, kiuj diversflanke akompanas la vivoverkon de la jubilanto. Bedaŭrinde, tre negative estas kritika kontribuajoj de nia akademiano Karolo Piĉ per jenaj vortoj: „Kompleta katastrofa, kvazaŭ dornon la bukedo, estas la somnambula artikolo „Evoluo de Esperanto“. Piĉ ĵonglas per bombastaĵoj senhavaj kaj laŭ kiu la bedaŭrinda lingvo de Zamenhof disponas pri magiaĵoj kiel i.a. „absoluta strukturo, perfekta artefariteco, absoluta skemo, maksimuma simpla, universala kombineblo, centprocenta konstanteco, senekzempla unikeco“ ktp. Ni krome ekscias en la neologisme mania lingvaĵo de Piĉ, ke „Esperanto ne evoluas ... eĉ ne povas evolui“ kaj ke „Esperanto senĉese abrupte evoluas“ kaj „tamen ne ŝanĝiĝas“. Komprenu, kiu povas.

KIEL DIRI? LENTAIGNE. Daŭrigo (pokračování). Konversaciaj frazoj. - ELEFANTO: fari el muso elefanton (přehánět, tro-igi). - HUNDO: bojas (štěká), jelpas (kňučí), hurlas (vyje). Hundoj terure hurlis, kvazaŭ morton antaŭflaris. Hundo libera, ĉenita. Hunda raso, vivo (mizera). Azilo por perditaj hundoj. Bojanta hundo ne mordas. Bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo. Por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabis. La lastan en la maso, la hundo atakas. Lughundo (vlčák). Levrelo (leporhundo). Spanielo. Vertago (jezevčík). Grifono (pudelo). Buldogo. Miksrasa hundo. Spurhundo. Mopso.

KAMELO: Estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la region de Dio. - KATO: miaŭas, kraĉospiras (prská), ĝibigas la dorson (hrbí se), buliĝas (schoulí se do klubka), ŝpinas (=ronronas = přede), faras velurpiedon (entiras siajn ungvetojn). Ekskato (kastrát) Domedukita kato. Tegmentleporo (slanga nomo de kato). Ne karesi la katojn kuspe, kontraŭ la haroj. Fali ĉiam plandalsube kiel kato (na všechny čtyři). Kontentigi la katon kune la raton. Danci kiel la kato ĉirkaŭ la poto. Botvestita kato (kocour v botách). LEPORO: Kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun. Pafi samtempe du leporojn = bati du muŝojn per unu bato. LUPO: Oni konas lin kiel blankan lupon (diskonata de ĉiuj). La lupino, kiu mamnutris Romulon kaj Remon. Ne enlasu lupon en ŝafejon. Lupo lupon ne manĝas. Inter lupoj krii lupe. Ne ĉio griza estas lupo. MUSO: musoj pepas. Monto gravediĝis, muso naskiĝis (aféra splaskla). Kuradi kiel venenita muso. PORKO gruntas (chrochtá). Muzelo (rypák). Ĵeti perlojn antaŭ la porkojn (esprimi altajn ideojn antaŭ malkleruloj).

KIO NOVA EN LA AKADEMIO DE ESPERANTO? (A.Pettyn, Pola Esperantisto 1/86). En la GRAMATIKA SEKCIO oni diskutos lastatempe la proponon pri la oficialigo FAR, kiun iuj e-istoj uzas, kvankam ĝis nun ĝi ne ricevis la akademian aprobon. Samtempe oni prikonsideris kelkajn niajn proponoj, ekz. far de, flanke de, fare de. Neniu el la akademianoj opinias, ke „far de“ estas taŭge. Aliflanke laŭ 24 akademianoj taŭga estas „fare de“, 8 el ili eĉ opinias, ke ĝi estas la plej taŭga el inter la prezentitaj proponoj. La subtenon de la 16 akademianoj ricevis „flanke de“ (cetere ĝi estas Zamenhofa!), nur 11 akademianoj subtenis „far“. Mi aldonu, ke 13 akademianoj opinias, ke „far“ estas netaŭga, kaj eĉ laŭ 12 akademianoj ĝi estas malrekomendinda. - La unua voĉdonado pri „far“ tute klare montras, ke denove ĉi tiu propono ne trovos la akademian aprobon. Dume en kelkaj revuoj oni plue trudis al la legantoj „far“. Oni havas impreson, ke kelkaj aŭtoroj per la uzado de „far“ volas esti „modernaj“, dume tre ofte en la sama teksto de la koncerna aŭtoro troviĝas elementaj lingvaj eraroj. Konkludo? Unue oni lernu la lingvo-bazon, oni uzu la lingvon korekte, kaj poste oni proponi plibonigojn. Cetere, se tiu aŭ tiu aŭtoro havas nenion por diri, la uzo de „far“ neniel helpas lin/ŝin.

KORESPONDI DEZIRAS: Freŝdatajn (ĉerstvé) adresojn el la tuta mondo vi trovos ankaŭ en Libereca Informilo, Internacia koresponda adresaro eldonas Esperanto-klubo, Poŝta kesto 194, CS 46001 Liberec, Ĉeĥoslovakio.

Mallongiloj: bk=bildkartoj, ĉl=ĉiu lando, ĉt=ĉiu temo, dez=deziras, iŝ=interŝanĝas, its=interesiĝas, j=jaroj, kol=kolektas, kor=korespondi, m=muziko, pm=poŝtmarkoj, s-ro=sinjoro, tm=tuta mondo.

Wang Huazhu, Zhuag Xie, Di-8 Fen Gongshi, Guangming Jie, Shenyang, Ĉinio, 23j instruisto, esperas kor kun studentoj, tradukistoj.

Mário Bosco, Legio de Bona Volo, Av. Rudge, 700 Bom Retiro, BR-01134 São (SP) Brazilo, volas kor tm.

Por Esperanto-Expozicio nova grupo deziras bk-dezirojn el la tm: Esperanto-grupo „Norda Erikejo“, Niedersachsenweg 9, D-2110, Buchholz 5, FRD-NSR.

Letervesperon organizas por la 25a de oktobro 1986 Esperanto-societo Malta okaze de 25-a datreveno de sia fondiĝo. Salutkartoj/bk el la tm bonvenaj. Respondo garantita. Inter la salutantoj estos lotumita SENPACA RESTADO en Malto por du personoj. Skribu al: Esperanto-societo (Malta), P.O.Box 142, Valetta, Malta.

Nikolaj Valoŝin, SU-263018 Luck, Volinskaja obl., ul.Lvovskaja 63a, kv.81, 23j pentristo, dez kor tm pri ĉt.

Esperanto-grupo, 16-20j, dez kor tm pri pacaj problemoj, lingvaj temoj k.a. Skribu al: A.Osokin, 454080 Ĉeljabinsk, ul.Engelsa, d.61,kv.40.

Esperantisto Grupo Ŝahin, Gamshidy, P.O.Box 46, Shahin-Shahr, Isfahan, Irano kor kaj iŝ bk kaj meti-artaĵojn.

Kuzik Jaroslav, SU-Ĉernovickaja obl. Karapĉiev, 37j instruisto dez kor tm, kol materialojn pri E-movado.

Zinkpe Lovi C.Ben, C.T.L.Guéné Malanville, Benino, s-ro 21j, dez kor tm kun ĉiuj, kiuj volas helpi en la studo de E-o kaj en la loka movado.

Gintaras Žiaušnys, Žemaitijos 9-25, SU-23500, Mažeikai, Litovio dez kor tm kol bk pm

Znamar Fernandes Costa, AOS 08, B1.d.ap.203-Octogonal, Brazilia-DF 700000 24-jara dez kor Glediscilda Silva Diniz, Q.11 lote 02-Setor Oeste, Gama-DF 72.400, 22-j dez kor pri literaturo kaj filozofio

Ilko Leite de Oliviere, Q.20 lote 52-Setor Leste, Gama-DF 72.400 26j dez kor pri m, turismo kaj sporto

Vích Josef, kantisto de kanthoro de Nacia teatro en Prago, 10600 Praha 10-Záběhllice CS, ĵus finis korespondan kurson kun vere eminenta rezulto. Dum la kurso li tre entuziasmiĝis. Sendu al li salutkarton – venis en nian rondon plua artisto!

S-rino D.Juana K. de Chuline, kolektanto de bk kaj pm k pri diversaj temoj: Sarmiento 457, B-Las Flores RA-5016 CORDOBA, Argentino.

R.Smeets, s-ro, 70 Fairfield, St.MT.HAWTHORN, Aus-žo 16, WA Aŭstralio ĉt

J.Emile Deligny, s-ro, 27j, 65 bis rue Saumaise, F-21000 DIJON, Francio aktivulo pri malarmado, kor pri naciaj vivamanieroj, organizita laboro.

Geflegistoj 17-23j, Jan Rieche, Esperanto-Grupo, DHM-Internat DDR-3027 Magdeburg, Pfeifferstr. 10 kor pri ĉt kun tm

Gilberte Lassale, 21 rue Judaique, F-33000 Bordeaux, Francio, ĉt, ĉl, s-ino

D-ro Akwasi Owasi OSEI, Komfo Anokye Teaching Hospital, P.O.Box 1934 KUMASI, GANO, kuracisto

Bruno CAMENTALE, 12 Rue Jean-Jaures, Romainville, Francio, 22j s-ro, ĉt

S-ro Hiag EKANGA, 1-er s/c M.Bell Jaques, B.P.1323 DCUALA, Kamerunio 22j

Leonid Mjasnikon, 182100 Velikie Luki, K.Liebnecht Str.3, kv 15 dez kor pri frazeologio, vortaroj, preparas disertacion. Sovetunio.

xmxxmx

xmxxmx

xmx

x

Esperantský klub  
29501 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka  
Presajo  
Imprimé 50%

EK MH 59/86